

**tejo**

tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo

## **TEJO-jarraporto**

Estraro kaj  
komisiitoj raportas  
pri siaj atingoj dum  
2006/2007



**Rubriko  
TEJO-  
membroj**

**Aktivado en  
Esperanto-Bosko  
en Pekino**

**Informu en  
TEJO-Aktuale**



Saluton!

La plej granda parto de ĉi tiu numero estas la jarraporto 2006/2007 de l' TEJO-estraro kaj la komisiitoj. Ne pensu, ke tio estas ia enua burokrataĵo. Ĝi fakte enhavas multajn interesajn kontribuojn pri la nuna stato de TEJO kaj la planoj por la estonteco. Aldone, ĝin

ornamas informplenaj tabebloj kun detaloj pri la membrokvanto kaj niaj financoj. Do vere indas legi ĝin

Krom la jara raporto vin atendas denove la rubriko TEJO-membroj, informo pri Esperanto-aktivado en Pekino kaj informoj pri nia retroŝta informilo TEJO-Aktuale.

Mi jam nun sentas ke mankas kontribuoj por TEJO-Tutmonde. Ĉi tiun numeron mi ankoraŭ sukcesis plenigi, ĉar mi enmetis la

longan jarraporton. Sed jam por la venonta numero povos esti multa pli malfacile. Mi do petas al ĉiuj, kiuj faras iun Esperanto-agadon, partoprenas iun gravan Esperanto-aranĝon aŭ seminarion, aŭ volas informi pri iuj venontaj agadoj, sendi al mi artikolojn pri tio, por ke TEJO-Tutmonde restu informplena kaj interesa legaĵo por la TEJO-membroj.

Agrablan legadon!

Marcos

## Enhavo

Jara raporto .....	3-13
Rubriko TEJO-membroj .....	14
Itala Kongreso de Esperanto .....	14
Kontakt-informoj kaj informoj pri TEJO .....	15
Aktivado en Esperanto-Bosko en Pekino (Ĉinio) .....	16
Informu en TEJO-Aktuale .....	16

### Limdato por 2007:5 – 15-a de septembro 2007!

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizoj povas ricevi ĝin.

Kontribuojn sendu (prefere) rete al [tejo-tutmonde@tejo.org](mailto:tejo-tutmonde@tejo.org) (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Marcos CRAMER), Nürnberger Straße 27a, 04103 Leipzig, Germanio. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!**

Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton.

Redaktisto: **Marcos CRAMER** (Germanio/Britio). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: [oficejo@tejo.org](mailto:oficejo@tejo.org). Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Pollando; rete: [skonpres@poczta.onet.pl](mailto:skonpres@poczta.onet.pl). **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

# Jara raporto de TEJO-estraro kaj komisiitoj 2006/2007

## Enkonduko

**David-Emil WICKSTRÖM, Prezidanto, IJK**

Jam preskaŭ pasis la oficperiodo 2005-2007 kiu finiĝos kun elekto de nova estraro dum la IJK en Hanojo (Vjetnamio). Kiel antaŭaj periodoj ĝi estis iomete turbulenta kun personaj ŝanĝoj kaj en la estraro kaj ĉe aktivuloj, sed ankaŭ kun kelkaj gravaj atingoj. Mi ege ĝojas ke ni (finfine) sukcesis ekhavi juran personecon en Nederlando. Kvamkam ĝi alportas plian administrativan laboron por ni, tio ebligas al ni (espereble) pli facile peti subvenciojn. Aldone, la revo pri oficisto fakte baldaŭ povas realiĝi (ni nur atendas la finiĝon de renovigaj laboroj en la CO). Mi ankaŭ ĝojas ke ni trovis novajn redaktorojn por Kontakto, TEJO-Tutmonde kaj TEJO-aktuale - bonvenon al la TEJO-teamo Paŭlo MOĴAJEV, Marcos CRAMER kaj Gabriel BEECHAM. Dankon al Ĵenia kaj Joel AMIS pro la bona laboro kiun ili faris. Laste, mi ankaŭ volas bonvenigi Katarzyna Marcinik kiel nia nova volontulino kaj samtempe danki al Marteno MINICH pro lia bone farita laboro (kaj preteco daŭrigi ĝis Katarzyna alvenis en la CO).

Grava agadero de la estraro dum la lasta jaro estis pli videbligi TEJO-n en la movado (vidu ankaŭ la aprobitan laborplanon por 2007: [www.tejo.org/files/laborplano%200607.pdf](http://www.tejo.org/files/laborplano%200607.pdf)). Kadre de tio ni interalie strebas igi nian retpaĝaron [www.tejo.org](http://www.tejo.org) junulara esperanto-portalo kun informoj pri renkontiĝoj kaj novaĵetoj de niaj landaj sekcioj, kaj doni al niaj membroj la eblecon verki blogojn pri sia agado kaj persona vivo. Nia vizio estas ke [tejo.org](http://tejo.org) estu la unua paĝo por informiĝi pri la junulara movado (sed konscias ke ni ankoraŭ ne atingis tion...). Ankaŭ kadre de nia laborplano ni produktis novajn informilojn

kun la celo informi pri TEJO en Esperanto – kalendaretoj kun la membroservoj de TEJO aŭ kun listo de gravaj retpaĝaroj. Espereble baldaŭ aperos murkalendaro kun la plej gravaj junularaj aranĝoj. Ni cetere ankaŭ elektis novan emblemon por doni al TEJO pli freŝan (aŭ freŝajn) vizaĝo(j)n - dankegon al Julia Litvinova, kiu elpensis la emblemon kaj kiu kreis la kalendaretojn.

Fine mi volas diri, ke estis interesaj du jaroj kun la nuna estraro kaj mi volas danki ĉiujn estraranojn (plejparte tiujn, kiuj ne daŭrigos en la estraro) pro ilia bonfarita laboro.

## Administrado

**Valentina SIDOROVA, Ĝenerala sekretario**

Novan TEJO-jaron, kiun ni kalkulas de IJK ĝis IJK, la estraro renkontis en nova konsisto. Seskapa: nova prezidanto kun la funkcio la estrarano pri kongresoj David-Emil WICKSTRÖM kaj nova kasisto Adélaïde CHARRIÈRE, kiu baldaŭ demisiis kaj lasis la postenon. Ĝi interalie ne estis vaka longe kaj estis reprenita de Ekaterina IGNATIEVA. Aliaj estraranoj, elektitaj en 2005, daŭrigis sian laboron. Persona involviĝo, kunlaboro, regula komunikado per retaj kunsidoj ĉiumonate kaj kunvenoj aŭtune kaj printempe en la Centra Oficejo permesis al la estraro paŝe sekvi la laborplanon kaj plenigi la taskojn enmetitajn en ĝin. Kun la bedaŭro mi nur konstatas, ke la manko de ret-aliro (fermado de reta kafejo en Benino) limigis la komunikad-eblecojn de estrarano pri Landa Agado François HOUNSOUNOU. Pri sia laboro estraranoj raportis regule, minimume unufoje en du monatoj, en cirkuleroj.

Signifaj ŝanĝoj okazis ĉe niaj komisiitoj. Ŝanĝiĝis la redaktoroj de movada revuo TEJO Tutmonde kaj de reta revuo TEJO-aktuale. De la 4a numero de la jaro 2007 ŝanĝiĝos ankaŭ

la redaktoro de Kontakto.

De la novembro 2006 en Centra oficejo de UEA por TEJO voluntulumas nova aktivulino.

La komitato, kiu estis elektita printempe 2006 kaj oficos ĝis la 31a de majo 2008, havis 2 laborsesiojn dum IJK en Sarajevo. La protokolo troviĝas ĉe la retadreso [www.tejo.org/vikio/Komitatkunsido\\_Dum\\_IJK\\_2006](http://www.tejo.org/vikio/Komitatkunsido_Dum_IJK_2006).

Maksimume oni havis 25 voĉojn kaj partoprenis multe da gastoj sen voĉoj. Komitatoj voĉdonante malfondis la fonduson "Freŝa vento", diskutis en grupoj informadan strategion, videbligadon de TEJO kaj regularon pri TEJO Tutmonde. Aŭtune per poŝta voĉdonado Komitato aprobis Jaran raporton 2005-2006 kaj Laboran planon de la estraro.

Indas diri, ke en la unua duono de 2007 venis la informoj de Landa Sekcio de TEJO en Irano, kiu nomumis sian reprezentanton en la Komitato de TEJO - Maryam BORCHLU.

La jaro 2007 estas la elekta jaro ĉe UEA. Por la periodo 2007-2010 TEJO en UEA-Komitato reprezentos Peter BALÁŽ kaj Haris SUBAŠIĆ.

## Membroj

La tabelo prezentita ĉi-sube montras ke la membrarkresko paŭzis en 2006, sed restis pli ol 500 membroj.

En 2006 TEJO havis membrojn en 77 landoj, kio estas



pli ol en 2005 (72 landoj). Observante la statistikon (vidu la tabelon sur la venonta paĝo), mi volas kun bedaŭro konstati signifan perdon da membroj en Rusio: 38 kontraŭ 83 en 2005. Verŝajne la respondo kuŝas en la IJK-partopreno, kio tre influas, kiel ni scias, la membronombron

## Financoj

### Katja Ignatjeva, Kasisto

Kiel vi vidas el kalkulo (sur paĝoj 6 kaj 7), la jaro 2006 finance estis ĝenerale pozitiva. Tio okazis antaŭ ĉio dank' al sukcesa subvenci-akirado, speciale de administraj subvencioj (EJF-C de Konsilio de Eŭropo kaj YOUTH 4.1). Aliflanke, TEJO la unuan fojon dum lastaj 5-6 jaroj ne faris ajnan peton por organizado de aranĝoj (EJF-A, YOUTH Agado 5). Ne mirinde, ke oni devis malpliigi elspezojn por aktiva agado (seminarioj, aranĝoj, informado ktp).

Ĉiuj aliaj spezoj: oficejaj kostoj, elspezoj por volontulo, laŭstatutaj elspezoj restis similaj al tiuj de antaŭaj jaroj. Laŭdindas la agado de Pasporta Servo, kiu ĉi-jare dank' al sukcesa agado pri akiro de donacoj kaj bona nivelo de vendoj, sukcesis konkludi la jaron kun pozitiva financa rezulto.

Kiel oni vidas el resumo de enhavo en fondusaj konteroj,

Jaroj	Kodo	2006	2005	2004	2003	2002	2001	2000	1999	1998	1997	1996
<b>Membro-kategorio</b>												
Junaj Membroj kun	MJ-T	342	361	267	231	235	337	350	451	451	598	550
Junaj Membroj-Abonantoj (+revuoEo)	MA(T)	132	131	137	139	161	201	241	220	260	277	274
Junaj Dumvivaj Membroj	DMT	25	24	24	23	18	19	19	17	17	17	19
Junaj Dumvivaj Membroj kun jarlibro	DMJ(T)	16	13	15	6	5						
Sumo Individuaj Membroj	IM	515	529	443	399	419	557	610	688	728	892	843
Dumvivaj Patronoj	DPT	21	21	21	18	17	17	17	14	13	12	11
Unujaraj patronoj	PT	64	64	76	81	82	90	94	96	100	101	108

N	Lando	2006	2005	Diferenco
1	Francio	49	45	4
2	Germanio	40	47	-7
3	Rusio	38	83	-45
4	Brazilo	26	20	6
5	Hispanio	22	11	11
6	Usono	20	21	-1
7	Italio	19	16	3
8	Britio	15	8	7
9	Belgio	14	10	4
10	Hungario	14	19	-5
11	Pollando	14	12	2
12	Nederlando	13	9	4
13	Japanio	12	11	1
14	Israelo	11	12	-1
15	Svedio	11	15	-4
16	Kroatio	10	6	4
17	Vjetnamio	9	12	-3
18	Danio	8	6	2
19	Finnlando	8	12	-4
20	Irano	8	9	-1
21	Meksiko	8	2	6
22	Bosnio- Hercegovino	7	3	4
23	Ĉeĥio	7	5	2
24	Madagaskaro	7	3	4
25	Tajvano	7	0	7
26	Aŭstrio	6	6	0
27	Svislando	6	6	0
28	Ukrainio	6	10	-4
29	Litovio	5	11	-6
30	Malavio	5	0	5
31	Serbio	5	4	1
32	Togolando	5	8	-3
33	Bulgario	4	4	0
34	Kazahio	4	1	3
35	Niĝerlando	4	4	0
36	Slovakio	4	4	0
37	Argentino	3	5	-2
38	Ĉinio	3	7	-4
39	Kubo	3	1	2
40	Moldavio	3	2	1
41	Norvegio	3	4	-1

N	Lando	2006	2005	Diferenco
42	Slovenio	3	1	2
43	Tagikio	3	1	2
44	Ĉilio	2	1	1
45	Estonio	2	1	1
46	Kanado	2	7	-5
47	Sud-Koreio	2	3	-1
48	Kostariko	2	2	0
49	Mongolio	2	0	2
50	Nepalo	2	3	-1
51	Niĝerio	2	2	0
52	Portugaliao	2	4	-2
53	Afganio	1	0	1
54	Alĝerio	1	0	1
55	Andoro	1	1	0
56	Armenio	1	1	0
57	Aŭstralio	1	1	0
58	Benino	1	3	-2
59	Bjelorusio	1	1	0
60	Burundio	1	1	0
61	Ĉadio	1	0	1
62	Domingo	1	3	-2
63	Ganao	1	2	-1
64	Irlando	1	1	0
65	Islando	1	1	0
66	Jordanio	1	1	0
67	Kolombio	1	1	0
68	Latvio	1	1	0
69	Panamo	1	1	0
70	Peruo	1	0	1
71	Rumanio	1	1	0
72	Salvadoro	1	0	1
73	Sud-Afriko	1	1	0
74	Tanzanio	1	1	0
75	Unuiĝintaj Ara- baj Emirlandoj	1	0	1
76	Urugvajo	1	1	0
77	Venezuelo	1	1	0
78	Ekvadoro	0	1	-1
79	Kongo, DR	0	4	-4
80	Nikaragvo	0	1	-1
81	Pakistano	0	1	-1

TEJO dum lastaj 3 jaroj (ĉefe dank' al pozitiva subvencipetado) sukcesis ŝpari iom da mono kaj momente posedas sume pli ol 60.000 EŬR. Tiu mono donas al nia organizo minimuman financan certecon ankaŭ por 2-3 venontaj jaroj, eĉ kaze ke oni ne plu sukcesos trovi ajnan eksteran subvencianton.

Estas bedaŭrinde, ke TEJO daŭre ne havas ajnan stabilan enspez-fonton. Nia vera (neŝanĝebla) enspezfonto venas de kotizoj de niaj membroj (TEJO ricevas inter 10 kaj 50% de ĉiu TEJO-kotizo). Sed tiu fonto (kutime ĝi alportas ne pli ol EŬR 3500 jare) estas nesufiĉa por kovri niajn bazajn elspezojn (ekz-e oficejajn kostojn). Nur kelkaj TEJO-agadoj (kiel ekz-e PS) estas sendependaj kaj strebas esti nemalprofitaj. Financa bonfarto de TEJO ĝis nun ege dependas de ekstera subvenci-akirado. Sed ĉi-lastata postulas grandan investon de homfortoj kaj bedaŭrinde, oni neniam povas plene kalkuli je ĝi.

Titolo	Jaro 2006		Totale
	Debeto	Kredito	
	EUR	EUR	EUR
<b>Volontulo</b>			
poŝmono volontulo	4280		-4280
vojaĝoj volontulo	117,74		-117,74
sanasekuro volontulo	129		-129
Alia		5,15	5,15
			<b>-4521,59</b>
<b>Oficejaj kostoj</b>			
luado de oficejo	1051		-1051
Kopiado	99,72		-99,72
retkostoj/komunikado/telefonado	44,69		-44,69
Poŝtokostoj	199,49		-199,49
aĉeto de oficejaj materialoj	1089		-1089
Alia			0
<b>Totale Kostoj Oficejo</b>			<b>-2483,9</b>

<b>Subvencio</b>			
<b>Administraj Kostoj</b>			
EJF C subvencio (Konsilio de Eŭropo)			
<i>*50% bilanco por EJF C 2005</i>		4886	4886
<i>*50% antaŭpago por EJF C 2006</i>		4218	4218
YOUTH (4.1) Administra (Europa Komisiono)			0
<i>*bilanco YOUTH 4.1. 2005</i>		2793	2793
<i>*antaŭpago YOUTH 4.1. 2006</i>		24800	24800
<b>Totale Subvencioj</b>			
<b>Administraj Kostoj</b>			<b>36697</b>
<b>Laŭstatutaj spezoj</b>			
TEJO-parto de MJT, MAT, JAM, PT kotizoj 2005			0 *3
Komitata Kunsido dum IJK			0
Laborkostoj Estraro	270,77		-270,77
Vizkostoj François Hounsounou	264		-264
Estraraj Kunsidoj (vojaĝoj, loĝhado, manĝoj)	4477,27		-4477,27
<b>Totale Laŭstatutaj spezoj</b>			<b>-5012,04</b>
<b>Aktivaĵoj</b>			
Trejnseminarioj dum TEJO aranĝoj	192		-192 *4
EJF A	0	0	0 *5
YOUTH Action 5 trejnseminarioj			0 *6
EJF B (Revuo Kontakto, Lingva Prismo)			
<i>*Kontakto 2005, bilanco</i>		720	720 *7
<i>*Kontakto 2006, antaŭpago</i>		1600	1600 *8

Tabelo de TEJO-spezoj 2006

Revuo TEJO Tutmonde			
*redaktado			0 *9
*grafikumado			0
*presado+sendado	1671,16		-1671,16
*abonoj			0
Retrevuo TEJO-Aktuale			
Pasporta Servo			
*redaktado	0	0	0
*presado+sendado	4520		-4520
*komisiaj vendoj 2005		2769	2769 *10
*vendoj de TEJO			0
*donacoj	2357,76		2357,76
alia	231,34		-231,34
<b>Totale Aktivaĵoj</b>			<b>832,26</b>
<b>KER</b>			
kotizo Eŭropa Junulara Forumo (FoJE)	1294		-1294 *11
Kotizo Volontula Servo (CCIVS)			0
Laborkostoj Aktivuloj			0
Vojaĝkostoj Aktivuloj	1728,5	1705,34	-23,16 *12
Kotizoj Lingvokursoj			0
<b>Totale KER</b>			<b>-1317,16</b>
<b>Informado</b>			
varbado (patronoj, membroj)			0
Informiloj	45		-45 *13
pago de retservilo tejo.org			0
reklamfolioj en revuoj			0
<b>Totale Informado</b>			<b>-45</b>
<b>IJK</b>			
Preparkunsido IJK	425,46		-425,46
Estraro IJK	334		-334
Licenspago IJK			0 *14
Profito/Deficito IJK			0 *15
Pago kotizo gajninto konkurso IJK 2005	35		-35
Alia (TEJO-akcepto dum IJK)	105		-105
<b>Totale IJK</b>			<b>-899,46</b>

<b>UK</b>			
Partopreno UK François Hounsounou	764,14		-764,14
<b>Totale UK</b>			<b>-764,14</b>
<b>Landa Agado</b>			
Laborkostoj			
Aktivuloj/estrarano LA	300		-300
Vojaĝkostoj Aktivuloj	0		0
Kunsidoj TEJK / LS	0		0
Alia (subvencio-gajninto Freŝa Vento: FLEJA)	280		-280
<b>Totale Landa Agado</b>			<b>-580</b>
<b>Financa Administrado</b>			
Bankokostoj	13,17		-13,17
Rentumo		726,05	726,05
<b>Totale Financa Administrado</b>			<b>712,88</b>
<b>Aliaj spezoj</b>			
Donacoj		1577	1577
Patrona Akcepto dum UK	176		-176
Karavano IJK-UK	31		-31
Invitiloj por albanaj e-istoj	111,59		-111,59
Alia	71,97		-71,97
<b>Totale Aliaj Spezoj</b>			<b>1186,44</b>
<b>Totale Elspezoj</b>	<b>24352,01</b>		
<b>Totale Enspezoj</b>		<b>48157,3</b>	
<b>Rezulto Jaro 2005</b>			<b>23805,29</b>
<b>Fondusoj</b>	<b>31.12.2005</b>	<b>31.12.2006</b>	
<b>Junulara Fondaĵo (tejtej)</b>	60823,79	67022,61	
<b>Ŝparkonto de TEJO (tejo%)</b>	16659,59	17385,64	
<b>Fonduso Dumvivaj Patronoj</b>	13623,39	13623,39	
<b>Fondaĵo Rezervo IJK</b>	7961,75	mankas informo	

Tabelo de TEJO-spezoj 2006 (daŭrigita)

## Mallongigoj uzataj en la spezo-tabelo kaj piednotoj al la tabelo

<b>EJF A</b>	Eŭropa Junulara Fondaĵo A, subvencio de Konsilio de Eŭropo por organizado de internaciaj junularaj renkontiĝoj (TEJO kelkfoje ricevis ĝin por organizado de diversaj aranĝoj, ekz-e por organizado de interkultura festivalo dum IJK en Pollando)
<b>EJF B</b>	Eŭropa Junulara Fondaĵo B, subvencio de Konsilio de Eŭropo por internaciaj junularaj aktivajoj aliaj ol renkontiĝoj (TEJO kelkfoje ricevis tiun ĉi subvencion por la revuo Kontakto)
<b>EJF C</b>	Eŭropa Junulara Fondaĵo C, administra subvencio de Konsilio de Eŭropo
<b>YOUTH 4.1.</b>	Subvencio de Eŭropa Komisiono (por administraj kostoj de junularaj organizoj)
<b>EGTYF</b>	European Good Templar Youth Federation (Europa Federacio de Nedrinkemuloj)
<b>MJT</b>	membro de TEJO kun Jarlibro kaj abono al Kontakto/TEJO-Tutmonde
<b>MAT</b>	membro-abonanto, t.e. membro de TEJO kun Jarlibro kaj abono al revuo Esperanto, Kontakto kaj TEJO-Tutmonde
<b>JAM</b>	Juna Aligita Membro, t.e. membro de Landa Sekcio por kiu estis pagita aparta kotizo al TEJO. Ne estas individua membreco
<b>PT</b>	Patrono de TEJO
<b>FoJE</b>	Eŭropa Junulara Forumo
<b>KER</b>	Komisiono de Eksteraj Rilatoj
<b>TEJK</b>	Tut-Eŭropa Junulara Konferenco
<b>FLEJA</b>	Flandra Esperantista Junulara Asocio
<b>Piednotoj</b>	
<b>*1</b>	100 EUR/semajne
<b>*2</b>	aĉeto portebla komputilo por TEJO-oficejo
<b>*3</b>	TEJO ricevas 10% de MAT, 25% de MJT, 50% de JAM, 75% de PT kotizoj. CO ĝis nun ne kalkulis parton de TEJO-kotizoj en 2006. Sekve, kotizoj 2006 eniros la rezultkalkulon de 2007
<b>*4</b>	trejnseminario dum IJK 2006
<b>*5</b>	en 2006 TEJO ne faris subvencipeton EJF A (vidu ĉi-supre)
<b>*6</b>	en 2006 TEJO ne faris subvencipeton YOUTH 5 (vidu ĉi-supre)
<b>*7</b>	bilanco (25%) de subvencio EJF B (vidu ĉi-supre)
<b>*8</b>	La unua parto (75%) de subvencio EJF B 2006
<b>*9</b>	administrotrota en 2007
<b>*10</b>	vendoj de PS pere de Libroservo de UEA
<b>*11</b>	kotizo 2007
<b>*12</b>	kredito montras repagon de FOJE de vojaĝkostoj de TEJO-volontuloj al kunsidoj de FOJE
<b>*13</b>	pago de retservilo
<b>*14</b>	licenspago de IJK 2006 estos administrotrota en 2007
<b>*15</b>	profita parto de IJK 2006 estos administrotrota en 2007. Laŭ decido de estraro 1/3 parto de profito, kiu devas eniri la kuran kontron de TEJO, iros al fondaĵo "Partorenu IJK"
<b>*16</b>	presado de vizitkartoj
<b>*17</b>	en 2006 subvencio de 800 EUR ricevis L. de Sousa Moreira



## Landa Agado

### François HOUNSOUNOU, estrarano pri Landa kaj Afrika agado, ILEI-rilatoj

La jaro 2007 estas tre aparta por mi pro diversaj kialoj. Manko de retumejo en mia regiono Lokossa. Malgraŭ tio, mi vojaĝis al Cotonou (105km for de Lokossa) por retumi, kio ne faciligis la taskon. La alia problemo ŝajnas ĝenerala problemo por la landoj Benino, Togolando kaj Niĝerio, kie la kurento ne regulis kaj ne regulas. Tamen mi sukcesis kunlabore kun la Benina Landa Asocio starigi la TEJO-sekcion BOJE, kies statuto kaj reglamento ŝanĝitaj estis senditaj al la ĝenerala sekretario. Por instigi la estraron de BOJE eki la laboron, mi organizis trejnseminaron pri interreto ĉe la retumejo; malgraŭ la forpreno de kurento la trejnseminario bone okazis kaj sukcesis. Por revigligi la niĝerian movadon, mi vojaĝis tien kun la celo reprezenti TEJOn dum la nacia kongreso. Sed nenio estas farite kadre de junularo pro la uzita lingvo dum la kongreso, kaj neniu estrarano de la landa asocio ĉeestis la kongreson. Bedaŭrinda afero. Mia celo estis/as gvidi la ganaan junularon en TEJOn. Pro tio, mi vojaĝis tien por renkonti ilin. La kunsido bone okazis, sed post mia reveno, neniu transprenis la paŝon. La 2an ĝis 12an de januaro 2007, mi partoprenis la trejnseminaron de Unicef en Benino sub la temoj: kulturo de la paco-solvigo de konflikto kaj prizorgo de traumatizitaj personoj. Mi dum la seminario alproksimiĝis al la respondeculo de Unicef, negocis kun li, por ke la sama seminario okazu por la afrika junularo kaj sciigis tion al TEJO. Sed ĝis nun, neniu demarŝo estas farita kadre de seminario aŭ iu TEJO-aranĝo en Afriko. Tre bedaŭrinde.

Aliflanke, mi korespondis kun la Korea sekcio pere de la komitatano de UEA por Koreio kun la celo sciigi pri la ĝustaj adresoj de la sekcio. La prezidantino favore respondis kaj plendis pri manko da tempo. Same kiel al la Dana sekcio, mi rekte skribis al ili kaj la informon ricevis TEJO.

Por altigi la nombron de sekcioj en Afriko,

pere de Afrika Komisiono, kie mi estas unu el la komisionanoj, mi rilatas kun la komisionano en Burundio sub la superrigardo de Renato CORSETTI por starigi tie la TEJO-sekcion, disponigante al Burundio la ekzempleron de statuto kaj reglamento, kiuj helpas al ili verki la sian. La laboro estas farita en Burundio kaj la statuto kaj la reglamento pretas. Ili estas senditaj al la ĝenerala sekretario de TEJO pere de mi. Mi renkontis la nunan prezidanton de JOTE, Junulara Organizo de Togolandaj Esperantistoj dum la ILEI-seminario en Porto-Novo, Benino. Mi parolis kun li por ricevi plian informon pri la evoluo de la sekcio. Letera raporto promesita ne atingis min.

Kio lamigis min ne estis nur la forpreno de kurento kaj manko de retumejo, sed ankaŭ miaj agadoj kadre de TEJO, kiuj estis transdonitaj al landa asocio. Tion neniu faris de malnova afrika komisiono. Mi pardonpetas ĉe miaj kolegoj kaj legantoj pro mia neĉeesto de la retkunsidoj lastmomente. Nenia kondiĉo favoris/as al mi ĉeesti ilin pro la supre menciitaj kialoj. La nuna retumejo, kiu ekfunkciis, iras paŝon post paŝo kaj fermas sian pordon je la oka horo. La retkonekto tute ne bonas.

En Kongolando, la tiea sekcio bone funkcias kaj la prezidanto de ĝi informis min pri la elekto de la estraro, kiu baldaŭ okazos. Mi diskonigis tra la diskutlisto de Afrika komisiono la anoncon por kandidatiĝi por la estraro de TEJO. La interesuloj kandidatiĝos.

Tiu ĉi raporto estas la lasta, ĉar baldaŭ alia transprenos mian taskon. Mi pretas helpi, konsili al li kiel Aleks KADAR faris al mi. Mi dezirus, ke mia anstataŭulo estu afrikano el lando, kie la movado ne tro fortas.

Plian vivon al TEJO, plian sukceson al ni ĉiuj.

## Informado

### Chuck SMITH, estrarano pri informado

#### Informiloj

Junie 2006 la estraro lanĉis grafiko-konkurson kies gajninto, Julia Litvinova,

prezentis novan belan emblemon por TEJO. Post tio, ŝi kreis belajn informiletojn kiuj disdoniĝos ĉe Esperantaj kongresoj. Nuntempe ni prilaboras grandan kalendaran afiŝon kiu enhavos detalojn pri ĉiuj gravaj internaciaj junularaj eventoj.

### **Pasporta Servo**

Mi vojaĝos al Hago por helpi al Derk translોકigi ĉion de la malnova paĝaro pri Pasporta Servo al la nova. Tio estas granda sukceso kaj intertempe ni ankaŭ decidis ke indas havi veran administran sistemon kun datumbazo por Pasporta Servo, sed vere estus malfacila tasko, kaj ni bezonas volontulon kun teknikaj spertoj (prefere en PHP) por fari tion. Dum tiu ĉi vojaĝo, mi ankaŭ trejniis la TEJO-volontulon dum la semajnfino.

### **Reta agado**

Kiam ni serĉis TEJO-volontulon, ni ne trovis bonan manieron serĉi homon por dungi en Esperantio, do mi kun teamo kreis la novan retejon Eklaboru per kiu ni trovis Gabriel Beecham por redakti TEJO-Aktuale. Ni ankaŭ daŭre paŝas al realigo de sendado de revuoj de Kontakto kaj TEJO Tutmonde al diplomitoj de lernu.net. Mi cetere kun teamo kreis novan interkonan retejon por esperantistoj, Amikumu.com kiu nun havas pli ol 1200 membroj en 80 landoj.

### **Eksteraj rilatoj**

#### **Haris SUBAŠIĆ, estrarano pri eksteraj rilatoj, vic-prezidanto**

Dum la pasinta jaro, mi daŭrigis labori pri esplorado de eblecoj por involviĝo de TEJO en ne-Esperanta junulara agado tutmonda, ne nur eŭroponivele. Kadre de tio, TEJO reprezentigis en la konferenco pri tutmonda kunlaboro, okazinta en novembro 2006 en Grekio. Ĉefa rezulto de tiu konferenco estas komenco de la proceduro de membriĝo de TEJO en ICMYO. ICMYO (angle: International Co-ordinating meeting of Youth Organisations) estas Internacia Kunordiga Kunsido de Junularaj

Organizoj, kiu efektive estas neformala reto de 27 diversaj internaciaj junularaj organizoj kaj regionaj junularaj platformoj el diversaj mondopartoj, kies celoj estas plifortigi rilatojn inter diversaj internaciaj junularaj organizoj tutmondnivele kaj kunordigite interrilati kun plej grandaj tutmondaj kaj internaciaj instancoj kaj organizoj kiel UN (Unuiĝintaj nacioj) aŭ Monda Banko. Tiunmaniere TEJO povus aliri kreantojn kaj influantojn de tutmonda junulara politiko, sed ankaŭ trovi novajn eblecojn por kunlabori kun aliaj junularaj movadoj tra la tuta mondo kaj oferti pli bonajn servojn al nia membraro. Espereble, tiu ĉi proceduro finiĝos ĝis la fino de la estraranejo kaj TEJO ekmembros en tiu ĉi platformo.

Niaj membroj reprezentis TEJO ankaŭ en aliaj internaciaj aranĝoj. Pri partopreno de Marek BLAĤUŠ el Ĉeĥio en la seminario en Korunjo en Hispanio sub la temo 'Ĉu tiu ĉi estas la Eŭropo kiun ni deziras?' eblis legi detalan raporton en la numero 121 (2007:1) de TEJO Tutmonde. Gregor HINKER el Aŭstrio reprezentis nian organizon en la diskuto pri volontulado en Eŭropo kiu okazis en Eŭropa parlamento en Decembro 2006, kaj tiel kontribuis al la evaluado kaj kreado de volontula junulara politiko en Eŭropo. TEJO ankaŭ sendis tri kandidatojn por someraj lingvo-kursoj kiujn ĉiujare organizas Konsilio de Eŭropo. Bedaŭrinde, malsame ol pasintjare, ili ne estis akceptitaj, ĉar estas malmulte da lokoj en la kursoj, por kiuj konkuras multnombraj reprezentantoj de diversaj internaciaj organizoj. Oni ankaŭ aktive partoprenis en la agado de Eŭropa Junulara Forumo (FOJE), kie oni klopodas plej bone speguli bezonojn kaj ideojn de nia organizo.

Komence de la jaro 2007 estis lanĉita nova programo (Junularo aganta, pli da informoj en anglalingva paĝaro ĉe [ec.europa.eu/youth](http://ec.europa.eu/youth)) de Eŭropa Unio, kiu celas subvencii diversajn junularajn projektojn en Eŭropo, sed ne nur. TEJO mem kaj niaj landaj kaj fakaj sekcioj jam plurfoje sukcese uzis antaŭan programon por fari diversajn projektojn, ĉefe seminariojn.

Por pli bone informi niajn membrojn pri tiu ĉi ebleco, oni faris prelegojn pri la programo dum grandaj junularaj renkontiĝoj – Ago Semajno en Pollando kaj Internacia Junulara Festivalo en Italio.

## Centra oficejo

### Katarzyna MARCINIK, volontulino

En la jaro 2006 komenciĝis mia volontulado por TEJO en Centra Oficejo en Roterdamo. Tiel ekde la 15a de novembro mi helpas la estraron realigi iliajn taskojn. Jen eta superrigardo:

- helpis al Haris sendi aliĝilon al FOJE
- ordigis la dosierojn
- helpis al Katja kun formularoj por subvencipetoj
  - kun helpo de Valentina, preparis protokolon de februara RetEsKu,
- helpis al Roy serĉi informojn pri Landaj Sekcioj (kaj aliaj informoj pri TEJO) por TEJO paĝoj en Jarlibro 2007
- helpis al Katja prepari raportojn por fondusoj EYF B Kontakto, EYF C, Youth Administra
  - helpis al Haris kun anonco pri lingvaj kursoj, kolektis aliĝilojn, korespondis kun kandidatoj, sendis aliĝilojn al DYS.
- komencis prepari priskribojn de diversaj informoj pri subvencipetoj ĉe estrara vikio.
- korespondis kun Yves NEVELSTEEN (FLEJA) kaj François HOUSSOUNOU (estraro pri Landa Agado) pri manlibroj pri vikipedio
  - serĉis informojn en TEJO arkivo por libro de Heidi Goes
- helpis al Clay kun aliĝiloj por UK kaj dissendo de dua bulteno
  - pretigis invitleterojn por François HOUSSOUNOU kaj Haris SUBAŠIĆ (EsKu)
  - sendis informilojn pri IJK al Katja Lodor (Belgio) por pendigi dum grava borso en "Flanders Expo" por la instruistaro
    - aliĝis kiel helpanto al teamo de IJK 2008 en Belgio
  - preparis fakturojn por raportoj por sub-

vencifontoj kune kun Katja

- umis per nova komputilo: ordigis poŝton, kreis necesajn dosierojn
- transportas necesajn datumojn de alia komputilo (lernis de Chuck kiel trakti la novan komputilon)
  - partoprenis Internacian Seminarion, kiu okazis en Wewelsburg en Germanio. Tie pretigis la Informtablon de TEJO. Preparis raporton pri pagoj dum IS. La raporto troviĝas ĉe [www.tejo.org/estraro-vikio/Raporto\\_De\\_Kasia](http://www.tejo.org/estraro-vikio/Raporto_De_Kasia)
  - dissendis la leterojn al Patronoj de TEJO.
- kontrolis informojn pri datumoj de Landaj Sekcioj (kiuj aperas en Jarlibro)
  - intertempe ordigas la arkivon de TEJO.
  - traktas ĉiutagajn retmesaĝojn kaj aliajn poŝtaĵojn de TEJO-oficejo.

## IJK

**David-Emil WICKSTRÖM, Prezidanto, IJK**

### Fonduso "Partoprenu IJK-n"

Ĉi-jare la fonduso disponeblis 1100 EUR por partoprenantoj de la IJK. Entute kandidatiĝis 7 membroj de TEJO kaj la estraro disdonis 2 premiojn.

Por finance sekurigi la fonduson "Partoprenu IJK-n" la estraro decidis ke duono de la licenspago estonte eniru la fonduson, ĉar ĝis nun la fonduso nur estis financita pere de donacoj. Per uzado de la licenspago ni ankaŭ povas pli bone argumenti antaŭ la estontaj LKK-oj pri la utilo de la licenspago.

## 2006

La IJK en Sarajevo estis sukcesa kun 301 partoprenantoj (423 aliĝintoj), kaj la nombro de partoprenantoj estis 301, partoprenantoj el 40 landoj. Ankaŭ finance ĝi estis profita kun 920 EUR (el tiu ĉi sumo triono iris al la LKK, triono al la junulara fondaĵo de UEA kaj triono al la rezervo IJK). La estraro de TEJO aprobis la raporton de la LKK la 6an de februaro 2007. Nome de la estraro mi ŝatus danki la LKK-n pro ilia bonega (kun)laboro!

### 2007

Mi sekvis la preparlaborojn de la LKK por la 63a IJK kaj kadre de tio partoprenis LKK-kunsidojn en Hanojo (Vjetnamio) dum la dua semajno de majo 2007.

### 2008

Pro manko de kandidatoj la decido pri la IJK 2008 estis plurfoje prokrastita. Laŭ nuna stato ĝi plej verŝajne okazos en Belgio.

## Pasporta Servo

### Derk EDERVEEN, komisiito pri Pasporta Servo

Pasporta Servo fidele aperadas. La eldono de 2007 aperis kiel kutime en februaro, presita de eldonejo NEPO (Maciej WNUK) el Pollando. En 188 paĝoj vi trovos 1294 gastigantojn el 89 landoj, 23 mapojn, malfeliĉe neniujn anoncojn kaj novajn Landajn Organizantojn en Brazilo kaj Kroatio.

La nombro da gastigantoj kaj landoj iomete malkreskis, sed ne zorgige (nur 2%). Tamen, Pasporta Servo daŭre spertas malfacilaĵojn kaj problemojn:

- Duono de la landoj havas nur unu ĝis tri gastigantoj, kaj duono de la gastigantoj loĝas en nur dek landoj.

- Urĝe mankas persono kiu povus dediĉi iom da tempo al la 'eksteraj rilatoj' de Pasporta Servo, al pli aktiva vendado de la libro, kaj al enspezoj per donacoj, anoncoj ktp.

Por tiu ĉi eldono ni enkondukis la eblecon de elektronika adreslibro por gastigantoj kiuj deziras tion. Kun la helpoj de bonvolaj Esperantistoj en Hispanio kaj Usono kiuj disponigis FTP-servilan spacon, pli ol 350 gastigantoj (27%) per retroŝto ricevis ligan al sia propra PDF-dosiero kun la propra nomo surstampita. Aldone, ĉirkaŭ 100 gastigantoj tute rezignis pri sia 'senpaga' ekzemplero. Krome, multaj gastigantoj libervole donacis monon por subteni Pasportan Servon. Se ni sukcesos daŭrigi Pasportan Servon laŭ tiu ĉi sistemo (kombino de elektronikaj libroj kaj libervolaj donacoj), ĝi finfine atingos finan-

ekvilibron.

Por 2007 ni planas plibonigi la hejmpaĝon de Pasporta Servo: post la transiro de la PS-paĝoj al Drupalo necesas ankoraŭ labori pri la tradukoj, la formularoj kaj la mapoj. Lingva kaj teknika helpo bonvenas. Krome, ni esperas krei retan datumbazon kiu faciligos la administran laboron de Pasporta Servo. Per tio gastigantoj povos pli facile konsulti kaj ŝanĝi siajn proprajn datumojn, sen ke tiuj datumoj estos videblaj al aliaj. La kompilanto povos pli rapide kontroli kaj redakti la ŝanĝojn. Ni esperas ke tiu reta datumbazo haveblos ĉirkaŭ junio, ĉar tiam eblas jam uzi ĝin por la konfirmoj por la eldono de 2008.

## TEJO Tutmonde

### Marcos CRAMER, redaktisto de TEJO Tutmonde


En junio pasintjare la antaŭa redaktisto de TT, Joel AMIS, anoncis ke li demisios kiel redaktisto. Mi sekve kandidatiĝis por la redaktista posteno, kaj post kiam mia kandidatiĝo estis akceptita de la TEJO-estraro, mi ekkomunikis kun Joel pri transpreno de la redaktista laboro. Li ankoraŭ sole finredaktis la lastan numeron de 2006; mi eklaboris por la unua numero de 2007 en decembro 2006. Rilate al la transpreno de la nova tasko ĉefe helpis al mi la antaŭa grafikistino kaj vicredaktisto de TT, Ĵenja AMIS. Mi nun estas la sola redaktisto kaj grafikisto de TEJO Tutmonde, sen vicredaktisto.

Numero 1 aperis en marto kun 20 paĝoj, kaj numero 2 en majo kun 16 paĝoj. Post kiam estis multaj kontribuoj al la unua numero, mi jam eksentis la mankon de kontribuoj ĉe la dua numero. Mi do alvokas ĉiujn aktivulojn skribi raportojn pri siaj aktivaĵoj por TEJO Tutmonde, por ke ĝi restu informplena kaj interesa legaĵo por niaj membroj.

Ekde la dua ĉi-jara numero TT aperas kun la nova emblemo de TEJO. TT komencis artikol-interŝanĝon kun la gazetoj de la landaj sekcioj de TEJO. Aldoniĝis nova rubriko al TT, en kiu ĉiu membro de TEJO havas ŝancon

mallonge prezenti sin. Mi esperas ke tio plaĉas al la legantoj.

## Kontakto Ĵenja AMIS, komisiito redaktoro de Kontakto



### Emeritiĝo

Tio ĉi estas mia lasta kontribuo al la jarraporto. Mi "emeritiĝos" post la apero de la tria numero 2007 – kaj ankaŭ post 5,5 jaroj da laboro kiel redaktoro de Kontakto (bonvolu legi mian antaŭ-emeritiĝan letereton ĉe [www.tejo.org/eo/node/419](http://www.tejo.org/eo/node/419)). Estis (kaj ankoraŭ estas) neimag-ebla plezuro kaj honoro redakti Kontakton, kaj mi estas tre dankema al ĉiuj, kiuj kontribuis, helpis kaj konsilis al mi! Ekde la kvara numero 2007 la redaktadon de Kontakto transprenos la nuna vic-redaktoro kaj ĉefprovglegisto de Kontakto, Paŭlo Moĵajev (Ukrainio), kiu jam ekde la unua numero 2007 faras multe da redakta laboro. Dum Paŭlo estos redaktoro, mi daŭre faros grafikan kaj prespretigan laboron, ĝis kiam Paŭlo spertiĝos sufiĉe por transpreni ankaŭ ĉi tiun flankon de la laboro.

### Aperintaj numeroj

En la dua duono de 2006 kaj la unua duono de 2007 aperis la jenaj numeroj de Kontakto:

- 214, 2006:4. Ĉeftemo - EGALAJ RAJTOJ/FEMINISMO. En kunlaboro kun la kampanjo "Ĉiuj diversaj, ĉiuj egalaj" de la Konsilio de Eŭropo. Tiu ĉi numero estis sponsorita de la KdE.
- 215-216, 2006:5-6 (duobla). Ĉeftemoj - CIVILIZACIOJ kaj AMO.
- 217, 2007:1. Ĉeftemo - MITOJ.
- 218, 2007:2. Ĉeftemo - LIBERO.

### Aperontaj numeroj

- 219, 2007:3. Ĉeftemo - PARANORMALAĴOJ/MISTEROJ DE LA MONDO
- 220, 2007:4. Ĉeftemo - "KUNE - POR PLI BONA MONDO".

(Temoj de la venontaj numeroj ankoraŭ ne estas strikte fiksitaj.)

Denove - dankegon al ĉiuj, kiuj helpis kaj kontribuis - kaj mi alvokas vin daŭre kontribui al Kontakto! Ĉiuj viaj ideoj, proponoj kaj - certe! - artikoloj ĉi-temaj kaj ajnatemaj estas pli ol bonvenaj!

### Listo de mallongigoj uzataj en la jarraporto

UEA	Universala Esperanto-Asocio
CO	Centra Oficejo
UK	Universala Kongreso
ILEI	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
EsKu	Estrara Kunsido
RetEsKu	Reta Estrara Kunsido
IS	Internacia Seminario
BOJE	Benina Organiso de Junaj Esperantistoj
PS	Pasporta Servo
TT	TEJO Tutmonde
UNICEF	angle: United Nations Children's Fund Esperante: la Infan-Fonduso de la Unuiĝintaj Nacioj
DYS	angle: Directorate of Youth and Sport Esperante: Direktorato pri Junularo kaj Sporto (Konsilio de Eŭropo)

## Rubriko TEJO-membroj

Kiel jam la pasinta numero, ĉi tiu numero enhavas la novan rubrikon TEJO-membroj. Ĉi-foje prezentiĝas nur unu membro. Mi alvokas ĉiujn legantojn sendi al mi siajn proprajn respondojn al la ĉi-subaj demandoj (kune kun foto), por ke ankaŭ ili aperu en la rubriko TEJO-membroj.

**- Kiel vi nomiĝas?**

Mi nomiĝas Uljana TSCHISTJAKOW, sed ŝatas kiam oni nomas min Ulja aŭ Uljaŝa. Tiuj nomoj estas pli personaj kaj karaj al mi.

**- De kiu lando vi venas, kaj kie vi nun loĝas?**

Mia denaska lando estas Rusio kaj mia urbo Sankt-Peterburgo. Kiam mi havis 15 jarojn, mi kaj mia patrino translokiĝis al Leipzig en la orienta parto de Germanio kaj ĝis nun tie loĝas.

**- Kiom da jaroj vi havas?**

Do, mi loĝas en Germanio jam 6 jaroj kaj venis al Leipzig en marto 2001 kun 15 jaroj.....

**- Kiel kaj kiam vi esperantistiĝis?**

Kiam mi estis 17-jaraĝa, mi ekhavis interesan ideon pri unu lingvo kiu povus esti egala por ĉiuj kaj enhavus multajn vortojn de eŭropaj lingvoj.

Tiu ideon mi rakontis al mia patrino, kaj ŝi tute trankvile diris al mi: "Sed jam ekzistas tiu lingvo, ĝi nomiĝas Esperanto." "Ĉu? - mi diris - kaj kial vi neniam rakontis tion al mi antaŭe?"

"Nu - diris mia patrino - vi neniam demandis pri tio..." Bona respondo ĉu ne? Post tiu konversacio mi eniris la Interreton kaj entajpis "Esperanto"; en la sama tago mi komencis lerni la internacian lingvon per la brazila kurso de Esperanto kaj duonjaron



Uljana TSCHISTJAKOW el Rusio,  
loĝanta en Germanio

poste vojaĝis kun Antonia Petschat kaj Dave Blair al mia unua IS en Naumburg.

**- Kiujn ŝatokupojn vi havas?**

Tajĝiĉuanon, fari kaj aŭskulti muzikon, kanti, fari stultaĵojn, distri mian koramikon de liaj aferoj, legi, lerni fremdajn lingvojn kaj komuniki kun esperantaj amikoj.

**- Kio estas via vivmoto?**

Amu kaj respektu homojn de via ĉirkaŭaĵo kiel vin mem. Kaj se tio ne sukcesas tiam apenaŭ provi fari tion.

### 74a Itala Kongreso de Esperanto - Pisa, 2007-08-31 ĝis 2007-09-07

Kiel plej efike investi 30 € en Esperanto-aranĝo? Pisa, Italio (2007-08-31 ĝis 2007-09-07), 30-eŭra aliĝ-kotizo rajtigas vin je:

- Tri tagoj da altnivelaj seminarioj, inter kiuj tri gvidataj de kvar akademianoj: Katalin KOVATS, Paul GUBBINS, Mauro NERVI, Baldur Ragnarsson kaj Spomenka ŜTIMEC.
- Partopreno en la 74a Itala Kongreso de Esperanto: kunsidoj, prelegoj, artaj kaj kulturaj aranĝoj.

- Duontaga vizito de Pisa.

Krome, eblos (perkotize) partopreni en du tuttagaj ekskursoj tra Toskanujo: Lucca, Garfagnana kaj Volterra; Groto de l' ventoj. Bonvenon!

Ranieri Clerici

PS: Por pluaj informoj, bonvolu skribi al:

Cristina De Giorgi (chriiss@sirius.pisa.it): Loĝejoj.

Nicola Minnaja (minnajanicola@tin.it): Seminarioj.

Brunetto Casini (edistudio@edistudio.it): Ĝeneralaj aferoj.

## Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la *Universala Esperanto-Asocio*.

TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.

La organizo defendas kulturalan riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

Retadreso: [www.tejo.org](http://www.tejo.org)

## Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176  
NL-3015 BJ Rotterdam  
Nederlando

Tel.: (010) 436 1044

Faksilo: (010) 436 1751,

Retadreso: [uea@co.uea.org](mailto:uea@co.uea.org)

## Estraro de TEJO

• Chuck SMITH (Informado, UEA-Rilatoj)

Leiblstr. 31, DE-74081 Heilbronn, Germanio

Retadreso: [chuck@tejo.org](mailto:chuck@tejo.org)

• David-Emil WICKSTRÖM (Prezidanto, IJK)

Fuglegårdsvænget 57, 1tv, 2820 Gentofte, Danio

Retadreso: [dew@tejo.org](mailto:dew@tejo.org)

• François HOUNSOUNOU (Landa kaj Afrika

Agado, ILEI-Rilatoj)

B.P. 226, BJ- Lokossa, Mono, Benino

Retadreso: [frank@tejo.org](mailto:frank@tejo.org)

• Haris SUBAŠIĆ (Eksteraj Rilatoj, Vicprezidanto)

Zagrebačka 80, BA-88000 Mostar, Bosnio-

Hercegovino

Retadreso: [hara@ikso.net](mailto:hara@ikso.net)

• Katja IGNATIEVA (Kasistino)

c/o Magnini via Don Minzoni 38, IT-20091 Bresso

(Mi), ITALIO

Retadreso: [katja@tejo.org](mailto:katja@tejo.org)

• Valentina SIDOROVA (Ĝenerala Sekretario)

3, rue des Nereides, 78180, Montigny-Btx, Francio

Retadreso: [valentina@tejo.org](mailto:valentina@tejo.org)

## Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la gazeton TEJO Tutmonde
- la revuon Kontakto
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso kaj la Internacia Seminario
- eblecon partopreni en seminarioj
- eblecon havi blagon ĉe tejo.org
- eblecon involviĝi en interesa kaj internacia agado

Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur [www.tejo.org/patrono](http://www.tejo.org/patrono) aŭ de la Centra Oficejo).

## Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe [www.tejo.org/aktivula\\_trejnado](http://www.tejo.org/aktivula_trejnado))

## Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da eblecoj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agaderoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" - TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo - eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmaniero, bv. rigardi ĉe [www.uea.org/alighoj/pag\\_manieroj.html](http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html) aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

## Esperanto-aktivado en Esperanto-Bosko en Pekino, Ĉinio



Divers-aĝaj partoprenantoj de la aktivado

La 14-an de aprilo 2007, la Pekina Esperanto-Asocio (PEA) organizas aktivadon – akvumi arbojn en Esperanto-Bosko, konstruita dum la 89-a UK en 2004. Rigardu [www.youtube.com/watch?v=JtTod2gySSI](http://www.youtube.com/watch?v=JtTod2gySSI) por vidi filmon de la aktivado.

Poste infanoj lernantaj Esperanton kaj ilia estrino de la Infana Ĝardeno prezentis programojn kune kun LI Weilun, prezidanto de PEA.

(Rigardu [www.youtube.com/watch?v=AdzL4PbaUNs](http://www.youtube.com/watch?v=AdzL4PbaUNs))

La studentoj de Ĉina Komunikativa Universitato kiuj lernas Esperanton ankaŭ salutas vin kaj prezentis programon ([www.youtube.com/watch?v=6DFANvWEgAk](http://www.youtube.com/watch?v=6DFANvWEgAk)).

Karaj samideanoj, bonvolu sendi al mi viajn opiniojn pri la aktivado kaj la videoj. Mia retadreso estas [bluacxielo@163.com](mailto:bluacxielo@163.com).

## Informu en TEJO-Aktuale

Post kiam la retroŝta informilo dumtempe ne funkciis pro manko de redaktisto, ĝi nun denove aperadas regule sub la gvidado de la nova redaktisto Gabriel Beecham. Legu liajn ĉi-subajn klarigojn pri TEJO-Aktuale.

TEJO-Aktuale estas retroŝta informilo de TEJO. Ĉiu povas aboni ĝin senpage. Ĝi aperas sufiĉe ofte kaj enhavas nur koncizajn, konkretajn informojn pri la junulara Esperanto-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj.

Ekzistas multe da paperaj revuoj, el kiuj oni povas ĉerpi diversajn informojn. Sed ofte okazas tiel, ke novaĵoj aperas lastminute kaj necesas ke aliaj homoj estu rapide informitaj pri ili. Paperaj eldonoj en tiaj kazoj ne helpas

ĉar ili tro malrapidas. Pro tio TEJO decidis krei ankoraŭ unu servon, pere de kiu ĉiuj novaĵoj povu rapide atingi siajn celojn.

Se vi havas iun interesan novaĵon kaj volas, ke ĝi aperu en TEJO-Aktuale, sendu ĝin al ni ĉe [aktuale-red@tejo.org](mailto:aktuale-red@tejo.org).

**Noto de la redaktisto:** TEJO-Aktuale legeblas TTT-e sur [www.tejo.org/tejo-aktuale](http://www.tejo.org/tejo-aktuale). Sur ĉi tiu retpaĝaro ankaŭ eblas aliĝi por retroŝte ricevi TEJO-Aktuale.